

Maltrafoj

Kiojn mi volis sed ne sukcesis fari en la Akademio

Sergio Pokrovskij

2021-12-14 20:20 Nsk

Enhavo

1	Adiaŭa elpaŝo pri miaj antaŭjuĝoj kaj iluzioj	2
1.1	Iluzioj prilingvaj	2
1.2	Iluzioj pri la Akademio	3
2	Neplenumitaj projektoj	3
3	Parolo kaj skribo (Alfabeto kaj fonemaro)	3
3.1	Kiom da fonemoj havas Esperanto?	3
3.1.1	La Akademion tio malmulte interesis	4
3.2	La latinalfabeto malbeno	4
3.2.1	С Ш Ѣ Ѥ Ѧ Ѭ — La Ŝava alfabeto	5
3.2.2	Asimilado de la propraj nomoj	5
3.2.3	La literonomoj	5
3.2.4	Vortodivido	6
4	Leksiko	6
4.1	Notoj pri OA1	7
5	Gramatiko	7
5.1	La respondoj je negaj demandoj	7
5.2	La artikolo	8
5.2.1	La provoj raciigi	9
5.3	Aspektologio	9
5.3.1	Profiloj, aŭ agformoj (<i>Aktionsarten</i>)	9
5.3.2	Konsisto, «apriora aspekto» (предельность, <i>telicity</i>)	10
5.3.3	Aspekto	10
5.4	Pri «pasivecaj adjektivoj»	10
6	Faka terminaro	11

7	Konkludo: Kial tiuj malsukcesoj?	11
7.1	Malemo ĝeneraligi	11
7.2	Bremsi	12
7.3	La limoj de la akademia agado	12
7.3.1	Revizio de la klasikaĵoj	12
7.4	Diligento kaj prestiĝo	13
7.5	Minuskomplekso de la orientanoj	13
7.6	Raportoj al la Akademio	14

1 Adiaŭa elpaŝo pri miaj antaŭjuĝoj kaj iluzioj

1995–2021: Kiojn mi ne faris en la Akademio (sed faris ekstere).

Historio de miaj (plejparte subkonsciaj) antaŭjuĝoj pri lingvoscienco, Esperanto kaj la Akademio.

Ĉu tamen iam la Akademio traktos ĉi tiun problemaron? Ĉi tiu prezentaĵo fakte estas kolekto da referencoj (plejparte hiperligiloj) al la koncernaj materialoj.

La prezentaĵon mi enretigis:

- HTML-e ĉe <http://kovro.heliohost.org/eo/AdE/14dec2021/Maltrafojs.html>
- PDF-e ĉe <http://kovro.heliohost.org/eo/AdE/14dec2021/Maltrafoj.pdf>

(Ĉi tiaj enkadraj pecoj estas prezentistaj notoj.)

La subtitolo ekzemplas pri «Diversaj ioj» [LOdE, n-ro 81, 2001:07].

Fine de mia 3^a kaj lasta mandato mi resumu miajn pensojn pri la Akademio.

Min ĉiam interesis lingvoj, jam longe antaŭ ol mi eklernis Esperanton. Kiel diris hungara tradukistino, eĉ supraĵa konatiĝo kun fremda lingvo estas tre instrua kaj utila; mi konsentas.

Do, mi fariĝis amatora lingvisto.

1.1 Iluzioj prilingvaj

1. Lingvoscienco kaj lingvoinstruado precipe interesiĝas pri la *diferencoj* inter la lingvoj. **Konkludo:** Lingvo Internacia maleblas.
2. Tamen la praktiko pravas, ke Esperanto ja funkcias. **Konkludo:** la komunajoj pli gravas.
3. Mi dekomence konsciis, ke la komunajo estas eŭropeca. Tamen ankaŭ ĉi tio estas interesa kaj valora — precipe pro raciigo kaj koherigo. (Ekz-e jes/ne.)

Tiom pri la lingvo. Nun pri la Akademio:

1.2 Iluzioj pri la Akademio

La kolegoj malkonsentos!! Sed mi parolas pri miaj *iluzioj*...

Pri (3): Tamen nur Sekcia Raporto, ne Akademia decido...

1. Raciigo kaj koherigo estas laboro kiun mi konas per la komitatoj pri normigo de programlingvoj. — La tasko de lingvoplanado kiel afero inĝeniera.
2. La Akademio esploras la lingvon kaj aplikas la rezultojn. Akademio kompetentas pri esperantologio; scienco ĝin interesas kaj estas por ĝi aŭtoritata.¹ (Historiaj ekzemploj: la teorio pri la radikkarakteroj; la ata/ita debato. Ĉu la nuna AdE kapablas je tiaj heroaĵoj?)
3. Mirinda escepto: la sekcia raporto «Pri vortordo en Esperanto» kaj miaj komentoj priaj.

— Tamen ...

- La «naivaj» akademianoj malŝatas lingvoscienccon (Esperanto estu simpla).
- Siaflanke iuj profesiaj lingvistoj el inter la akademianoj malvolas apliki lingvoscienccon en la profana Akademio (administra instanco ne dekretu sciencajn verojn).

La ekstretoj sin tuŝas.

2 Neplenumitaj projektoj

Tuj mi parolos pri kelkaj projektoj kiuj ne interesis la Akademion (kaj kiujn mi realigis ekster la Akademio).

Tiel mi ilustras la diferencon inter la iluzioj kaj la realo.

Cetere, la mondo evoluas, ĉu eble iujn tio ekinteresos? Fakte, ĉi tiu prezentaĵo estas komentita kolekto da referencoj.

Mi parolos ne kronologie, sed laŭfakte:

1. Alfabeto kaj fonemaro
2. Leksiko
3. Gramatiko

3 Parolo kaj skribo (Alfabeto kaj fonemaro)

3.1 Kiom da fonemoj havas Esperanto?

Jen la unua iluzio kaj tre simpla ekzemplo:

Esperanto havas 28 fonemojn, pounue respondajn al ĝiaj 28 literoj.

¹ «Artikolo 2. La Akademio esploras ĉiajn lingvajn demandojn, kiuj koncernas Esperanton.» (Statuto de AdE).

Laŭ mia studaĵo «Duonvokaloj kaj diftongoj» (2014; disponebla HTML-e kaj en PDF) *ŭ* ne estas fonemo, ĝi estas parto de la fonemoj *aŭ* kaj *eŭ*. Sekve,

1. La nombro de fonemoj en Esperanto estas 29.
2. La esperanta skribo ne estas strikte fonologia.

El ĉi tiu ŝajne skolastika studo sekvas tute praktika konkludo pri neesperanteco de la uzado de *ŭ* por transskribi la parolsonon [w] (*Ŭashington* ktp).

3.1.1 La Akademion tio malmulte interesis

Verdire, ĉe la publikaĵo en la «Lingva kritiko» aperis komento de Cyril Brosch, kiu tamen tiam ankoraŭ ne estis akademiano.

(Referenco al publikaĵo en «Lingva kritiko» principe estas pli solida ol tiu al mia retejo; sed en la vikia formo de *WorldPress*, adoptita de LK, mi ne sukcesis prezenti miajn artikolojn en taŭga tipografio.)

Respektive tiaj konsideroj speguliĝas en la prezento de la skribsistemo de Esperanto, kiel mi montris en mia studaĵo pri la koncepto «Grafemo» (ankaŭ en «Lingva kritiko»). Kiom da grafemoj havas Esperanto?

Praktika konsekvenco: Ĉe vortotransporto oni ne tranĉu *na-ŭan*, *fe-ŭda* ktp.

Tiaj abstraktaĵoj ne estas io esotera; ekz-e ili estas parto de komuna klero en ekz-e Ĉeĥio.

Ĉeĥe *č*, **ch**, *ř*, *š*, *ž* (*čé*, *chá*, *eř*, *eš*, *žet*) estas apartaj literoj, dum *á*, *é*, *í*, *ó*, *ú*, *ý* (*dlouhé á*, *é*...) estas dugrafemaj kombinoj de baza vokallitero kun la longindika dekstra korno. Ĉeĥaj lingvonormigaj instancoj kaj la publiko tion kompreni kapablas.

(Simile estas pri la lingvo hungara — sed ne plu pri la hispana.)

Tamen en Esperanto eĉ la terminoj *fonemo*, *fonologio*, *grafemo* ne estas oficialaj.

3.2 La latinalfabeta malbeno

Alia fonto de iluzioj kaj miskomprenoj estas **la novlatina alfabeto**, kiu diversmaniere priservas malsamajn lingvojn, kio trudas fremdajn, malproprajn ideojn pri ĝiaj esprimiloj kaj iliaj funkcioj en aliaj lingvaj sistemoj.

La brilega ekstera fono de la grandaj kaj praktike gravaj nacilingvoj eklipsas kaj perturbas la percepton de la modesta sistemo de Esperanto.

La dulteraĵoj *aŭ*, *eŭ* estas nedivideblaj grafemoj samspecaj kiel la anglaj *ch*, *sh*. Kaj estus logika uzi anstataŭ ilin *â*, *ê*. T.e.

aŭto → *âto*, *eŭro* → *êro*, samkiel *she* → *ŝi*, *charm* → *ĉarmo*.

Sed ial tio ne akcepteblas en la latinalfabeta mondo (kvankam islande ja *á* = *aŭ*, ekz-e *Pálina* = Paŭlino).

Kiel sentiĝi al la okcidentanoj la ekzistadon en aparta, propra skriba sistemo — ne surogata adaptaĵo de fremda sistemo pruntita kaj alifunkcia, sed plene kohera kun la sistemo de koncerna lingvo?

3.2.1 La ŝava alfabeto

Ĉi tiu elpensado certe estas herezo malkonvena kadre de la Akademio. Tamen unu el la kolegoj ĵus deklaris en Akademia forumo, ke «Oni povas ĝui hororon»; kaj mi ne povas min reteni kaj ne taŭzeti la akademianojn.

Mia studaĵo «La Ŝava alfabeto por Esperanto».

trajteca alfabeto = featural writing system:
alfabeto, en kiu la literformo ne estas tute arbitra, sed kohere kodas fonologiajn ecojn de la fonemo(j), kiu(j)n la litero reprezentas.

1. *Trajteca alfabeto*, ekz-e pl (pb), sz (sz), tiel ke
«pobo», «sezono» → pob , sez ;
2. Formala simetrio: «eco» / «edzo» → ed / ec
3. Kaj kompreneble «aŭto», «eŭro» → at , eu .

Ĉi tiu alfabeto (ĉiuliteraĵo):

La alfabeto, kiu estas laŭ la fonologiaj ecoj de la fonemoj, estas laŭ la fonologiaj ecoj de la fonemoj.

Cetere atentindas: 30 literoj ŝave-esperantaj kontraŭ 45 Ŝavaj literoj anglaj.

3.2.2 Asimilado de la propraj nomoj

Parte aprobita en la rekomendo Akademia (2013) — tamen ne tiom detale, kiel en mia studaĵo «Propraj nomoj, la esperantaj kaj la fremdaj» ĝenerale, kaj en

- «Pri esperantigo de franclingvaj nomoj» (ankaŭ en Vikipedio)
- «Pri esperantigo de germanlingvaj nomoj»

speciale. Estas iom tikla demando, ĉu AdE aprobadu tiajn rekomendojn.

Tikla demando — ĉar misinterpretebla kiel interveno de ekstera, fremda instanco en onian lingvon.

3.2.3 La literoj

Ĉi tiu temo tuŝas la problemaron de 3 sekcioj: tiu pri la Prononco, la leksikano (Ĝenerala vortaro) kaj la Gramatiko.

Malgraŭ la grandega rolo de la novlatina alfabeto, restas la problemoj pri la literoj de ĝiaj neesperantaj literoj Q, W, X, Y.

$$w = \{vv \mid uu\} \rightarrow vu$$

Mi verkis pri tio, interalie, en:

1. Komputada Leksikono
2. Slavonaj skriboj
3. Pri literoj

Tiu lasta atentigas krome la literojn de ŭ, y, tiujn de la literoj grekaj kaj hebrea.

3.2.4 Vortodivido

Jes, oni rajtas tranĉi vortojn ie ajn. Sed en la fajna tipografio ekzistas sia belo. Kaj la komputiloj povas esti pli kleraj ol la privatuloj.

En la jaro 1999^a, mi preparis vortodividajn ŝablonojn por Teĥo, kaj deponis ilin ĉe teTeX. Poste la ŝablonaro iĝis parto de diversaj programproduktoj, i.a. Mozilla, OpenOffice, Adobe- kaj Kobo-librolegiloj ktp. Nun la projekto rezidas ĉe GitHub.

Mia ŝablonaro ĝenerale sekvas la principojn de PAG, kvankam sen la atavismoj ŝuldataj al la latinalfabeta malbeno (ekz-e la hezito tranĉi *k-s* aŭ *k-v* respondajn al la francaj *x*, *qu*). Por mi tia hezito estas amuza, mi tranĉas ekz-e

Leksiko: lek-si-ko; kp


Pl: lek-

sy-ka, Ru: лек-

си-ка. La tranĉo «le-

ksiko» donas «ksi...» komence de linio, kio estas malbela.

Miajn principojn mi resumis en «Rekomendoj pri vortodivido en Esperanto».



Kiel tio aspektas ekz-e sur telefona ekrano? Jen 3 ekrankopioj.

1. Unue, sen vortodivido kaj maldekstreme (sen ĝisrandigo);
2. Due, sen vortodivido kaj kun ĝisrandigo (atentu la emfazitajn spacojn!);
3. Trie, kun vortodivido kaj ĝisrandigo. Al mi tio plaĉas.

4 Leksiko

Pri leksiko mi plej multe laboris en ReVo; tie aperas rimarkoj de mi subskribitaj; kelkaj el ili kreskis en tutajn studaĵojn, ekz-e:

- «Fandi kaj gisi» (ankaŭ en LODE, № 187, 2010:5).
- «Muta naturo» (LODE 2010:11 № 193).
- «En Rusio loĝas rusianoj» (LODE 163, 2008:05).
- «Okazo kaj kazo» (LODE, № 234–235, 2014:4–5; № 236; n-ro 237).
- «Tiuj ĝenaj homonimoj homogenaj» en LODE, n-ro 284 (2018:06).
- «Notoj pri la tradukdifinoj en la Unua OA»

Pri la laste listigitaj «Notoj» iom laboris la Sekcio pri la ĝenerala vortaro; sed ĝi ne sukcesis fini la laboron.

4.1 Notoj pri OA1

Miaj Notoj pri 62 vortoj el OA1 disponeblas rete. Ties tradukoj ofte malkoheras; ofte la signifo de la vorto evoluis kompare kun la signifo oficialigita (kvankam angloj kaj francoj tion ne facile rimarkas):

- **anten'** — antenne | antenna | Fühlhorn | щупальце | мачка.
- **diafragma'** — diaphragme | diaphragm |
Zwerchfell | грудобрюшная преграда | przepona brzusna.
- **sankcio** — internacie havas 2 kontraŭajn signifojn:
 1. aprobo, permeso [Z]
 2. puno aŭ agoj por malebligi, ĉesigi.
- Mi proponas ke la Akademio rekomendu vorton *sankciumo* aŭ *sankciono* por la du punaj sencoj (sankciumo antaŭvidita de leĝo; sankciumo kontraŭ miskondukta regno).

La freneziga «sankcio» estas eminenta ekzemplo pri malracieco de la internacia leksiko.

5 Gramatiko

5.1 La respondoj je negaj demandoj

«Ĉu jes aŭ ne?». Ankaŭ en LODE, n-ro 246/247 (2015:4/5), p. 12–15.

Frapa ekzemplo pri nelogika trajto, kiun plimulto ne konscias (ĉar en la okcidentaj lingvoj estas tiel), kaj sekve la gramatikistoj sankcias.

«Oni uzas ankaŭ negativajn demandojn, [t.e.] demandojn kun nea vorto.» [PMEG]

- En la «matematika», aŭ «orienta» sistemo la respondoj al la negaj demandoj obeas la ĝeneralan regulon (oni jesas aŭ neas la tutan aserton); **ne necesas** iel ajn apartigi ilin.
- En la «okcidenta» sistemo por ili estas aparta malsimpla regulo, kiu postulas specialan analizon.

— Ĉu ŝi ne venis?
 — Ne, ŝi venis! ☹ / Jes, ŝi ne venis. ☹
 — Jes, ŝi venis! ☹ / Ne, ŝi ne venis. ☹
 Laŭ PMEG, en la okcidenta sistemo,

«Se la demando estas nea, oni respondas per la sama respondvorto, kiun oni uzus, se la demando estus sen nea vorto.»

Onidire, «Ambaŭ sistemoj respondi negajn demandojn estas [egale] logikaj, sed en malsamaj manieroj».

Ne «egale»!

1. En la orienta sistemo la negaj demandoj ne estas *escepto*, ne necesas aparta regulo.
2. La orienta regulo estas ĝenerala kaj klara, la reguloj de la okcidenta sistemo ĝis nun estas fuse vortumitaj.

Eble tamen la akcepto de la orienta sistemo ne estas senespera: ja multaj logikemuloj volonte akceptas nekutimajn dirmanierojn, pri kies plia logikeco ili konsciiĝis.

Nu, kiel do en la okcidenta sistemo oni respondu la demandojn de la tipo:

1. Ĉu vi *ne* deziras kafon?
2. Ĉu *ne* kafon vi deziras?
3. Ĉu vi deziras *ne* kafon, sed brandon?
4. Ĉu vi *ne* dormas pro la bruo?
5. Ĉu longe vi ŝin *ne* vidis?

(Okcidente probable endus distingi «la demandojn parte negajn» disde la «ĝenerale negaj».)

5.2 La artikolo

Mia studaĵo «La artikolo», ankaŭ en «Lingva kritiko» kaj «La Gazeto» № 139–140 (2009).

1. Utila por lingvoj senfleksiaj, en Esperanto la artikolo estas malnecesa. (Mia defio pri kontraŭekzemplo restas nerespondita.)
2. Kiom ajn malnecesa, la artikolo tamen estas lingva fakto.
3. Devigite ĝin havi, ni almenaŭ raciigu ĝian uzadon. Ho ve, tio ne prosperis (kaj la okcidentanoj eĉ ne rimarkas tion).

Pri (1):

En kelkaj lingvoj, precipe en la franca, la *nedifina* artikolo ofte estas uzata kiel remaigilo. Tamen Esperanto havas nur la artikolon difinan; kaj la libera vortordo ebligas remaigi pli oportune (ne nur substantivojn).

5.2.1 La provoj raciigi

- La okcidentaj esperantistoj ellaboris ian kompromisan uzadon, bazitan sur la artikolado de la Eŭropa lingva unio.
- Ĝi estas racie tondita neracia komunaĵo: **katalogo da esprimoj**.
- Tiun komunaĵon la okcidentanoj uzas sufiĉe unuece (ĝi ja estas komunaĵo).
- Ĝi do estas reala lingva fenomeno, tamen ĝi plu restas fenomeno nekomprenita.
- Kaj kiel tia ĝi plu restas granda lingva problemo por esperantistoj kies hejmlingvo artikolojn ne havas.

5.3 Aspektologio

Fenomeno komplementa al la artikolo: por la okcidentanoj same malklara, kiel la artikolo por la slavoĵ aŭ ĉinoj. Tamen ja pli utila kaj klarigebla.

Miaj «Notoj aspektologiaj»;

ties simpligita versio «Aspektoj» en LODE, 2019:3, № 293, p. 37–49.

Aspektualoj (la gramatikaĵoj kiujn oni ofte konfuzas kun la aspektoj):

Eo (Sergie)	en	ru	de
taksiso	order	таксис	
profilo	lexical aspect	тип действия	Aktionsart
konsisto	telicity	предельность	
aspekto	grammatical aspect	вид (глагольный)	Aspekt

Taksiso esprimas interrilaton de agoj (vicigo, enkadrigo); mi dirus *topologio* — sed tian metaforon komprenus nur matematikistoj.


5.3.1 Profiloj, aŭ agformoj (*Aktionsarten*)

La angla termino *lexical aspect* estas misgvida kaj fuŝa: en la slavaj lingvoj la aspekto (la vera aspekto, вид) estas esprimata leksike.

Profilo: 2 ② Desegno de la vertikala sekco de konstruo, fortikaĵo, aŭtomobilo, maŝino ks, por montri la relativan dikecon de la seĝtoj, la internan dispozicion kc. [NPV]

En la rusa lingvo ekzistas proksimume 15 kutimaj profiloj esprimataj per afiksoj. (Dependas je difino; ekz-e PAG ne komprenas la diferencon inter *finmanĝi* kaj *tutmanĝi*, dum ruse *доесть* kaj *съесть* estas nepre malsamaj.)





5.3.2 Konsisto, «apriora aspekto» (предельность, *telicity*)

1. Verboj 1-komponentaj = procezo. ← verboj senlimaj (*iri, vivi, dormi*)
2. Verboj 2-komponentaj = (procezo, limo) ← verboj limhavaj (*veni, morti, vek*i)

esti — iĝi, ekesti
havi — ricevi, akiri, ekhavi
serĉi — trovi, elserĉi
paroli — diri
vivi — naskiĝi, morti
agonii — morti

5.3.3 Aspekto

- Sencas por la verboj limhavaj.
- En la aspekto **neperfektiva** esprimas la procezon.
- En la aspekto **perfektiva** esprimas la atingon de limo:

Li venis = Li jam estas ĉi tie.

Li mortis = Li estas malviva.

Kiam venis la kuracisto, la paciento jam **mortis** {= estis malviva} ≠

Kiam venis la kuracisto, la paciento jam **estis mortanta** ≈

Kiam venis la kuracisto, la paciento jam **agoniis**.

5.4 Pri «pasivecaj adjektivoj»

Mi postlasas ŝuldon: la ellaboro de decido pri «pasivecaj adjektivoj», iniciatita de kolego Kramer kaj de mi transprenita.

Temas pri signifo de rekta adjektivigo de rezultaj verboj (ekz-e *korekta, komplika, fiksa, malferma, veka...*). Mi konsentas pri la intenco kaj la konkludo de la decido, sed min stumbligis ĝia parto teoria.

Ja ne pri pasiveco temas, sed pli ĝenerale pri rezulteco (limeco). La problemo egale koncernas la rezultan signifon de adjektivigoj de verboj netransitivaj (ekz-e *morta*). La tradicia gramatiko okcidenta malkonas la aspektualojn, kaj tial problemon *profilan* oni perceptas tra la kategorio *voĉa*.

Tial mi verkis la studaĵon aspektologian. Sed ĉu la Akademio pretas trakti tian problemaron?

6 Faka terminaro

Antaŭ mia akademianiĝo mi verkis «Komputadan leksikonon».

Cetere, la normigo de la liternomoj gravas por la multaj fakoj. Ekz-e *delto, omikro*.

Dum mi estis direktoro de la sekcioj Faka kaj Gramatika, mi plurfoje proponis okupiĝi pri **terminaro gramatika** (ja nia labora terminaro). Neniu reagis.

Mi ne scias, kion fari pri la fakoj nomenklaturaj (kiaj ĥemio, biologio, medicino). Ili evoluigas apartan formalan lingvon, konkurencan kun la komuna (ekz-e kun siaj apartaj numeraloj). Tiuteme mi verkis la studaĵon «La nomoj de la elementoj ĥemiaj».

La komuna lingvo tion transformas. Ekz-e “Covid-19”. **19** estas esenca parto de la termino, sed komunlingve neniu ĝin mencias. Oni diras ekz-e «malsani je korono» aŭ «kovimulo» aŭ «kovimulejo» (Ru ковидарий).

7 Konkludo: Kial tiuj malsukcesoj?

7.1 Malemo ĝeneraligi

Ofte la Akademio restas en la kadroj de la ekstera polemiko, sen levi sin pli alte, esplori pli vastajn horizontojn kaj eventuale proponi pli bonan solvon.

Ekz-e Bernardo Golden iam plendis, ke en la hezito inter la iom longa *spontanea* kaj la ŝajnsufiksa *spontana* la Akademio restas katenita de tiuj du truditaj ebloj, kaj malvolas ekzameni la ankoraŭ pli mallongan, senambiguan kaj latine ĝustan alternativon *sponta*.

Ekz-e en la debato pri ata/ita oni ial malvolis atenti la helpverbon, kiu povas klare apartigi la stat-pasivon disde la ag-pasivo:

- La pordo *estis* malfermita je la 6^a horo.
- La pordo *iĝis* (*ekestis*) malfermita je la 6^a horo.

kiel en la pola

- Drzwi *zostały* otworzone o szóstej.

7.2 Bremsi

Sed eble la malaktiveco de la Akademio estas normala?

Nia prezidanto (1995--1998) Werner Bormann iam diris, ke la funkcio de la Akademio estas *bremsi* (= gardi la lingvon).

Tuj la konsisto de la Akademio draste ŝanĝiĝos, venos novaj homoj. Ĉu ni antaŭtimu troan kreemon?

(Mi ne tro antaŭtimas. La Akademio jam plurfoje abolis siajn malprosperajn decidojn, kaj tio ne estis katastrofo. La popola inercio sufiĉas por stabiligi la lingvon.)

7.3 La limoj de la akademia agado

- Esperanto pretendas esti simpla, kaj certgrade estas kontraŭscienca.
- La orakolaĵoj de la Akademio devas esti eternaj — kaj simplaj. La Akademio ne verkas traktaĵojn.
- **Resume**, la Akademio ne povas trakti demandojn reale malsimplajn.

Eventuala solvo: Modelaj tekstoj (fakte, tiel funkcias la Fundamento).

Akademio povus reveni al la tradicio de «Tekstoj aprobitaj». Kvankam necesus pli zorga ekzameno. (Tamen tasko nereala.)

7.3.1 Revizio de la klasikaĵoj

Fakte, multaj niaj klasikaĵoj entenas krudajn erarojn, tiel ke oni hezitus rekomendi ilin al la lernantoj. Tial bonvenus akademie aprobitaj prilaboraĵoj. Mi mem faris kelkajn tiajn (kvankam sen aprobo de la Akademio ☺):

- A.Puŝkin/A.Grabowski: «La neĝa blovado»
- Moliero/Zamenhofo: «Georgo Dandin»
- Dikens/Zamenhofo: «La batalo de l' vivo» (kunlabore kun B. Moon kaj B. Pabst)
- Senkeviĉo/Lidja Z: «Kien ci iras?» (prilaborita «Quo vadis?»)
- Voltero/Lanti': «Kandido, aŭ Optimismo» — HTML-e, Fikŝenbuke, PDF-e

Ĉe tio tamen ĉiam restas la danĝero de malkompetenta prilaboro. La Kabea tradukon de «Patroj kaj filoj», samkiel la tradukon de «Quo vadis?» la publiko plejparte konas per kripligitaj eldonoj kies nekonata eldonisto zorge elsarkis ĉiujn aspektualojn, sen imagi, ke en multaj okazoj li ŝanĝas la signifon de frazoj. Tio estas tiom pli indigniga, ke mankas averto pri okazinta misredaktado.

Oni eble kritikos min pri miaj propraj prilaboraĵoj, en kiuj mi iam grave ŝanĝadis la tradukon. Sed mi ja klare, okulfrappe avertas pri miaj ŝanĝoj. Kaj plejparte ili estas serioze motivitaj.

Ekz-e al la okcidentanoj «Quo vadis?» ŝajnas bona kaj taŭga titolo. Por ili Latino estas la memevidenta eklezia lingvo. Sed tiel ne ĉie estas. Oriente la ekleziaj lingvoj estas aliaj. La apokrifoj, de kiu venas la titolo, estis verkita en Siriako; krom la latina, estas konataj aliaj ĝiaj tradukoj, inter ili greka kaj slavona. Ne mirindas do, ke la rusa traduko sonas slavone: «Камо грядеши?».

Sed en la koncerna epizodo, kie rolas nur galileanoj, la demando devus soni aramee, en la hejma lingvo de la partoprenantoj. Oni do devus aŭ arameigi la demandon — aŭ ĝin esperantigi, kiel oni faras pri alilokaj similaj dialogoj. Lasi ĝin latina estas ne malpli stranga, ol traduki ĝin slavonen.

7.4 Diligento kaj prestiĝo

Mi vidis plurajn kolegojn (cetere meritoplenajn) kiuj dum 9 jaroj neniel agis en la Akademio.

Ni ĉiuj kaj ĉiam vivas en la tempo malfacila ... Ne ĉiam ni trovas tempon kaj fortojn por volontula agado akademia.

Tamen ekzistas grandaj kaj sukcesaj projektoj volontulaj. Ĉi tiun prezentaĵon mi preparas per libera programaro.

Eble la esperantistaro iĝis malpli amasa.

Sed ankaŭ gravas la prestiĝo de la Akademio. Pluraj eminentaj esperantistoj, al kiuj mi proponis kandidatiĝi por akademianeco, rifuzis.

7.5 Minuskomplekso de la orientanoj

Ekstereŭropanoj gravas por la Akademio por evidentigi la kaŝitajn malkoheraĵojn kaj nelogikaĵojn (la profesiaj lingvistoj okcidentaj ne sufiĉas por tio — kp la nekonscion pri la problemoj de la artikolado).

Ho ve, tro ofte ili estas pli sklavigitaj de la antaŭjuĝoj de la okcidenta lingvoscienco ol la okcidentanoj mem:

1. Multaj el ili vidas Esperanton tra la optiko formita dum la lernado de la angla aŭ franca lingvo.
2. Mi mem tiel lernis Esperanton. Sed dum ĉe la lernado de fremda nacilingvo oni devas senproteste akcepti ĉiujn kapricojn de la lernata lingvo, ĉe lernado de Esperanto oni libere ĝin ekzamenu kaj kritiku.
3. Tamen ankaŭ en Esperantujo pli prosperas tiuj, kiuj konformiĝas ol tiuj, kiuj povus malfermi novajn horizontojn.

7.6 Raportoj al la Akademio

Kiel sciencigi la Akademion? Mi opinias, ke dezirindus havi ian specon de *Comptes rendues de l'Académie*, t.e. «Raportoj al la Akademio de Esperanto», en kiujn ĉiu akademiano povus prezenti studaĵon (sian aŭ de eksterakademia samideano) pri tiu aŭ alia problemoj de nia lingvo.

(Ne necesas publikigi ilin surpapere, sufiĉus aperigo kaj arĥivigo en la Akademia retejo.)

Tiaj studaĵoj ja havus *ombron* de la akademia aŭtoritato, estus referenceblaj, kaj kontribuus al la evoluigo de esperantologio; formale ili estus nur aparta opinio de akademiano; sed per speciala sankcio de la Akademio (aŭ de ties sekcio) tia raporto povus ricevi statuson oficialan. Tio ebligus akceptadi decidojn kiuj postulas ellaboritan aparaton kaj kiujn oni ne povus oportune (sufiĉe mallonge) prezenti en akademia decido.